# *Kulturpolitika vespero plus popolaj festoj oma?e al la 26-a de julio*



**Teatro Heredia de Santiago de Kubo**

Santiago de Kubo, jul 25 (RHK) La teatro Heredia gastigos hodia? la kulturpolitikan vesperon oma?e al la 70ª datreveno de la historiaj sturmoj al la militaj kazernoj Moncada kaj Carlos Manuel de Céspedes, kio markis turnopunkton en la kuba historio por sendependeco kaj suvereneco.

La? informis la direkcio de kulturo en tiu ?i orienta urbo, la vespero ebligos ?ui la arton de la Simfonia Orkestro Junula de la Konservatorio Esteban Salas. La kulturan re?isoradon faros Osvaldo García. Anka? sin prezentos studentoj de la Profesia ArtLernejo José María Heredia, la geaktoroj Maikel Eduardo kaj Dalia Leyva kaj la giratisto-kocertistoj Aquiles Jorge.

La teatra vespero anka? estos dedi?ita al la 508-a  fondodatreveno de la urbo; anka? sin prezentos aliaj artistoj, la koruso Madrigalista, konataj artistoj kaj la baletkompanio de Santiago plus la muzikensemblo Sepopo Los Guanches.

Okazos samtempe popolaj festoj, muzikbandoj sin prezentos en publikaj parkoj tra la tuta provinco; oni prezentos novan muzikdiskon Santiago, pasio por libereco kaj nova Rumo Santiago datreveno 70.

La fama avenuo Victoriano Garzón gastigos muzikan spektaklon oma?e al la urba fondodatreveno la 25-an de julio 1515, plus popolaj dancoj je kongao de famaj kompanioj Kabiosile kaj Promenejo Los Abelitos.

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/329471-kulturpolitika-vespero-plus-popolaj-festoj-omage-al-la-26-a-de-julio](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/329471-kulturpolitika-vespero-plus-popolaj-festoj-omage-al-la-26-a-de-julio)

**Radio Habana Cuba**